ISSN:0291-6037

# la informilo

***


## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

**eldonisto:**

ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*
*Maison des Jeunes et de la Culture*
*27, rue de la République, 54000 NANCY F*
*PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY*



**nouvelle série**

**trimestriel**

**1er trimestre 1983**

n° 41

**abonnement**


**un an: 18 F**

**UNU JARO : 18 F**

**( 8 INTERN. KUPON. )**

**ANTO-FLASH... ESPERANTO-FLASH... ESPERANTO**





# NOTRE 42ème CONGRES FEDERAL A LUXEMBOURG

********************************

## 22-24 avril 1983

Invités par l'Association Espérantiste du grand Duché, les espéranto-phones de la région Est de la France vont tenir congrès dans une ambiance authentiquement internationale... c'est dans la MAISON de l'EUROPE précisément que les participants vont dresser le bilan de leur action récente et élaborer de nouvelles stratégies pour promouvoir l'utilisation toujours plus étendus de la langue Internationale.

Luxembourgeois et Français travailleront parallèlement durant cette fin de semaine studieuse et se retrouveront pour des séquences communes, en particulier pour la Soirée Culturelle Internationale où se produira entre autre le jeune chanteur guitariste hongrois Feri Floro.

En siégeant à LUXEMBOURG les pratiquants de l'espéranto pourront témoigner concrètement de l'efficacité de l'outil qu'ils manipulent.. ce qui confortera l'initiative des trois députés belge, anglais et allemand du Parlement Européen qui ont saisi officiellement l'Assemblée d'une proposition tendant à inclure l'espéranto dans l'éventail des langues offertes aux élèves des Pays de la Communauté

bulletin d'adhésion inclus dans ce N°

## LE CONGRES NATIONAL DE L'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

aura lieu à ROMANS, du samedi 2 avril au mardi 5. A l'ordre du jour, un débat exhaustif sur la prochaine campagne nationale d'information qui débutera en automne. Ce thème d'activité future s'insère dans le grand plan de travail mis au point par les délégués des Fédérations Régionales qui se sont réunis à Paris, le 22 janvier dernier.
Le Congrès s'offrira bien sûr de la détente au cours d'une soirée artistique avec la participation du groupe folkloriuqe "La Harpe"; banquet et bal traditionnels sont également au programme et deux excursions sions dans le Vercors et la Drôme-Sud.

## DES NOUVEAUTES DANS LE MATERIEL D'ETUDE DE L'ESPERANTO

Restés longtemps d'aspect et de contenu "classiques", les manuels d'apprentissage de l'Esperanto font peu à peu "peau neuve" et s'inspirent de plus en plus des dernières découvertes de la pédagogie des langues. Il convient de mentionner la trilogie éditée par l'Union Française pour l'E°, qui permet, sous les directives d'un instructeur, d'assimiler la langue à des degrés divers, depuis l'approche complète, méthode utilisable au cours d'un stage de fin de semaine par exemple (METODO 10), d'en avoir une connaissance suffisante pour parler et correspondre (METODO 11) ou d'affiner son savoir (METODO 12). Les deux derniers manuels cités seront bientôt accompagnés d'une cassette et d'un fascicule complémentaire pour en permettre une utilisation personnelle.
Les hispanophones quant à eux, ont désormais à leur disposition un excellent ouvrage dont l'auteur, F. De Diego, est membre de l'Académie Mondiale d'E°.
Plus original, puisque rédigé uniquement en espéranto, donc utilisable dans tous les pays, le manuel d'Audrey Childs-Mee intitulé "Esperanto aŭtodidakte" a recours à un ingénieux système de références qui permet d'esquiver l'usage de la langue maternelle pour apprendre l'espéranto.

## L'ESPERANTO ET LES RADIOS-LIBRES (SUITE)

"RADIO 3", l'une des très actives radios libres parisiennes, vient d'insérer dans sa grille d'émissions, un cours régulier d'E°. D'une durée de 3 mois, diffusé 2 fois chaque semaine, ce cours fonctionne en collaboraiton avec l'UFE qui met à la disposition des élèves-auditeurs les textes et exercices, plus éventuellement un service de correction. La Fédération France-Est vient à son tour d'informer les radios libres régionales de sa disponibilité pour une information ponctuelle ou systématique sur l'esperanto.

## LES MASS-MEDIAS ET LE RECENT CONGRES UNIVERSEL D'ANVERS

Les Congrès Mondiaux d'Esperanto suscitent de plus en plus d'intérêt auprès des grands moyens publics d'information. La dernière statistique en date à la suite du Congrès 1982, fait état de 3 émissions télévisées, 22 programmes radiophoniques, 49 articles de presse en néerlandais, 20 en françias, 1 en anglais, 26 en langues diverses, 3 manchettes "à la une", 25 photos... Dès avant le rassemblement, 3 conférences de presse avaient permis la parution anticipée de 16 articles et suscité 5 interviewes radiodiffusées.

## UN NOUVEAU DIPLÔME DE DOCTEUR... GRÂCE À L'ESPERANTO

Une thèse magistrale de deux volumes -601 et 243 pages!- a permis à Tadeuzs Ejmont, de l'Université de LODZ, d'acquérir le diplôme de Docteur en Sciences Pédagogiques. Titre de la dissertation: *"Fonctions éducatives de la Langue et du Mouvement Espérantiste entre 1956 et 1980 - aspects nationaux et internationaux"*. On note donc une progression certaine du nombre des thèses universitaires qui prennent comme support l'un des aspects de la Langue Internationale.

## FORMATION OFFICIELLE DE PROFESSEURS D'ESPERANTO...

Pour la 11ème année, l'inauguration officielle d'un lectorat d'esperanto a eu lieu à l'Ecole Supérieure de Pédagogie de KIELCE... Pologne. Ce lectorat est une véritable pépinière d'instructeurs de la Langue Internationale, qui utilisent leur compétence dans des lycées de diverses villes polonaises; l'un d'entre eux enseigne même l'esperanto à Londres!
De son côté la Chine continue de former du personnelenseignant de la L.I. Un séminaire de 3 semaines a eu lieu à Nankin, à l'Institut des Postes et Télécommunications. A Pékin s'est ouvert, le 15 septembre, la seconde session de "Pédagogie de l'Esperanto". 15 Professeurs d'Ecoles Supérieures et 12 futurs Professeurs d'Esperanto envoyés par différentes Associations locales y suivront les cours durant une année.

## DES JUBILAIRES HORS DU COMMUN

Teo Jung, fondateur du journal HEROLDO DE ESPERANTO... qui en est à sa 63ème année de parution, vient d'entrer dans sa 91ème année et de fêter ses ... 72 années de pratique de l'esperanto. Membre de l'Académie Mondiale d'Esperanto durant 22 ans, Teo Jung a fait paraître une autobiographie extraordinaire de 400 pages sous le titre "Un pour tous".
L'esperanto aurait-il des vertus de jouvence? En Finlande en effet, la télévision vient de diffuser unfilm de 50 minutes sur le "90ème printemps d'une sommité de l'esprit" et consacré à Vilho Setälä, autre Académicien Espérantiste... l'un des plus grands photographes de son pays.
*-DERNIERE MINUTE- Le vétéran des espérantophones français serait un Meusien: Lucien BANNIER a appris l'esperanto en... 1906!... et vient également de fêter ses 90 ans. C'est l'un des trois fondateurs de l'Association Anationale Mondiale S.A.T.*

## AUTRES CONGRES, AUTRES LIEUX

Le congrès de SAT-Amikaro (Union des travailleurs Espérantistes des Pays de Langue Française) aura lieu à St-Brieuc les 2,3 et 4 avril 1983. Le Congrès Mondial de SAT (voir ci-dessus) se tiendra à linz, en Autriche, du 30 juillet au 5 août 1983. Pour répondre à un désir d'information de nos lecteurs, signalons que les buts essentiels de ces organisations sont la diffusion (SAT-Amikaro) et l'application (SAT) de l'esperanto au service de l'émancipation des travailleurs, de la lutte contre le dogmatisme, le racisme, la xénophobie et le bellicisme, et, d'une manière générale, pour l'environnement et la vie, pour la liberté, le progrès social, la solidarité transnationale et la Paix.

## DE NOUVELLES RUES ZAMENHOF ET "ESPERANTO"

C'est au cours du Congrès National Italien d'E° que le Maire de San Giulano Terme (Province de Pise) a inauguré une rue dédiée au Dr Zamenhof. En Espagne, c'est dans un quartier neuf de la capitale que la "Calle del idioma Esperanto" a été inaugurée , sous la présidence du conseiller culturel de la municipalité et en présence de tous les habitants de la nouvelle artère. A cette occasion, le Lycée ESPERANTO de Madrid a "baptisé" son nouvel étendard lors d'une cérémonie amicale, en présence du proviseur et de nombreux professeurs.

# NOTRE RUBRIQUE PERMANENTE: *L'ESPERANTO AU SERVICE DE LA CULTURE*

*"L'introduction de l'espéranto dans les programmes et horaires d'enseignement n'est pas envisagée actuellement..."*

Alain SAVARY, Ministre de l'Education Nationale

... Les Ministres responsables des 28 pays suivants sont-ils donc déraisonnables???...

**D'après une statistique établie au début de l'année par le professeur Germain Pirlot d'Oostende (Belgique), l'Esperanto est enseigné légalement dans 28 pays dans des universités ou instituts supérieurs, à savoir:**

1) **Allemagne Fédérale:** universités de Hambourg et Saarbrücken
2) **Autriche:** Université de Graz, institut linguistique d'Innsbruck et Institut Pédagogique de Vienne
3) **Brésil:** Universités de Belem, Fortalez et Juiz de Fora
4) **Bulgarie:** Instituts sup. de Sofia, Svichtov, Varna
5) **Canada:** Université de Sherbrooke
6) **Chine Populaire:** Universités de Pékin, Chengdu, Chongqing, Nankin, Shanghai et Wuhan
7) **Etats-Unis:** Universités de Cambridge (Massachusetts), Edwardsville (Illinois), Elsah (Il), Eugene (Oregon), Los Angeles (Californie), Provo (Utah), San Diego (Cal.), San Francisco (Cal.) et Wilmington (Ohio)
8) **France:** Universités d'Aix-en-Provence et Clermont-Ferrand et Rennes
9) **Grande-Bretagne:** Université de Liverpool
10) **Hongrie:** Universités de Budapest et Debrecen, inst. de pédagogie de Debrecen, Eger, Sárospatak et Szombathely

A. Savary est-il au courant?

11) **Italie:** instituts de Cagliari (Sardaigne) et de Cesena
12) **Norvège:** enseignement facultatif dans les classes de 8e et 9e de l'école primaire
13) **Pays-Bas:** Université d'Amsterdam
14) **Pologne:** Ecole polyt. de Byalistok, école sup. de pédagogie de Bydgoszcz, académie de médecine de Krakôv, univ. de Krakôv, école polyt. de Lodz, univ. de Lodz, univ. catholique de Lublin, école sup. de pédagogie de Olsztyn et univ. de Torun.
15) **Roumanie:** Universités de Bucarest, Cluj-Napoca, Iasi, Timisoara
16) **Suisse:** La Chaux-de-Fonds (canton francophone), Losone et Solduno (canton italophone Ticino)
17) **Tchécoslovaquie:** cours facultatifs à l'école primaire, Prague (univ.)
18) **Union Soviétique:** Univ. de Riga (Lettonie), Tallinn (Estonie) et Tartu (Estonie), univ. de Barnaul et Krasnodar (Russie)
19) **Yougoslavie:** activité libre dans l'ens. primaire et secondaire cours réguliers à l'univ. de Split
20) **Brésil:** Univ. de Baumu (Sao Paulo)
21) **Colombie:** Univ. de Bogota et Medellin
22) **Corée du Sud:** Univ. de Daegu et Séoul
23) **Equateur:** Univ. de Quito
24) **Espagne:** Institut linguistique de Laguna (Tenerife)
25) **Iran:** Univ. de Téhéran
26) **Japon:** Univ. de Kobe et Takamatu
27) **Venezuela:** Univ. de Caracas
28) **Chili:** Univ. de Santiago (section pédagogique)

**cours de 20 -28) = cours non confirmés officiellement!**

**Situation fin 1981!**

*************************************************

# Réduire le monopole de l'anglais

... ENSEIGNEMENT DES LANGUES: ENFIN UN PLAN COHERENT.

*Sous ce titre, Jean VARTIER, de l'EST REPUBLICAIN, analyse les propositions du Professeur GIRARD, au Ministre de l'E.N.. Une nouvelle fois il y est fait allusion au "statut particulier, incontournable" de l'anglais... du choix de l'anglais par la "quasi-totalité des élèves: 80% en 1ère langue et 20% en seconde"...* Tout en constatant "l'échec de la politique de diversification de l'apprentissage des langues étrangères...préconisée depuis une douzaine d'années"... le rapporteur ne propose rien d'autre... que l'élargissement de l'éventail des langues offertes... et 3 orientations à suivre pour mieux les enseigner! Il semble intéressant de se reporter au document déjà publié dans nos colonnes et qui garde sans doute sa valeur d'actualité:

OFFICE DE STATISTIQUE DE VIENNE = 15 Décembre 1975. En fonction des études suivies par les 6000 ouvriers et ingénieurs d'une entreprise...

| | | |
|---|---|---|
| = 2160 personnes auraient dû savoir l'anglais... | l'enquête n'en donne que | 100! |
| = 540 auraient dû savoir le français... | l'enquête n'en donne que | 10! |
| = 180 " l'italien... | " | 6! |
| = 60 " le russe... | " | 0! |
| = 480 " d'autres langues... | " | 10! |

Faut-il ajouter que cette statistique n'a pas pris en compte les travailleurs immigrés!

Parlamento Europeo
Gruppo socialista

Europees Parlement
Socialistische Fractie

Europa Parlamentet
Den socialistiske gruppe

Parlement Européen
Groupe socialiste

Europäisches Parlament
Sozialistische Fraktion

European Parliament
Socialist Group

Ευρωπαϊκό Κοινοβούλιο
Σοσιαλιστική Ομάδα

BRUXELLES, le 22 novembre 1982,

Proposition de résolution
présentée par M. GLINNE (B.), KEY (G.-B.), ROGALLA (D.)

"Conformément à l'article 47 du règlement sur l'opportunité d'admettre la langue internationale nommée "Espéranto" comme matière à option dans les programmes de l'enseignement secondaire et de l'enseignement supérieur dans les pays membres de la Communauté européenne;

le Parlement européen,

= constatant les problèmes linguistiques qui se posent dans la Communauté Européenne entre les populations des différents Etats Membres,

= estimant que le cloisonnement linguistique et culturel sépare les peuples d'une façon plus stricte qu'une frontière,

= estimant que de nos jours, le rapprochement physique, social, économique et politique des peuples s'impose chaque jour davantage,

= constatant que la conférence générale de l'U.N.E.S.C.O. a reconnu que les résultats obtenus au moyen de l'espéranto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples correspondent aux buts idéaux de cet organisme,

= rappelant qu'à l'Assemblée Nationale de la Vème République Française, une proposition de loi a été déposée pendant la première session ordinaire de 1979-1980 tendant à inclure la langue internationale Espéranto dans l'enseignement supérieur comme langue à option,

1. *Invite le Conseil des Ministres à faire examiner, à l'occasion d'une prochaine rencontre des ministres et responsables politiques de l'enseignement des Etats, Länder et Communautés Culturelles de la C.E.E., l'opportunité de l'introduction de l'Espéranto comme langue d'option dans l'enseignement secondaire et l'enseignement supérieur dans tous les Etats Membres de la Communauté,*

....... "

---

Jen kopio de rezolucio ĵus proponita far belga, angla kaj germana eùrop-parlamentanoj socialistaj.
Ni petas vin diskonigi tiun novaĵon kaj sendi ĝentilan leter(et)on, preferinde en la franca, aŭ eĉ en via gepatra lingvo -certe NE en Esperanto!- al S-ro


Ernest GLINNE, député européen

Parlement Européen, 3 Bd de l'Empereur, aŭ...97-113 rue Belliard
B-1000 BRUXELLES B-1040 BRUXELLES

privata adreso: 1 square Allende,
B-6180 COURCELLES

Kiam eùropa parlamentano kuraĝas okupiĝi pri E°, nepre ni estu multaj por gratuli lin! Se ni nenion faros, ni ne plu rajtos plendi, ke oni ne interesiĝas pri nia lingvo, ĉar tiam nur ni kulpos! Instigu al reago ankaŭ viajn samklubanojn.

kie..




Du 22 avril
au 24 avril 1983

De la 22a ĝis
la 24a de aprilo

*Mi povas nur plenjesi la amikan inviton al vi, far Brian kaj Claude MOON-NOURMONT (vidu la apartan aliĝilon), kiuj jam de pluraj semajnoj klopodas aranĝi kontentigan gastigadon de la estontaj kongresanoj, kaj mi anticipe dankas al ili...*

*Fakte...* "tre indas partopreni nian kongreson!
"es lohnt sich, an unserem Kongreß teilzunehmen!
*"l'intérêt de notre congrès mérite votre présence!"...*

*Kial?...*

1= MALKOVRO DE LUKSEMBURGIO*... en plena printempa etoso, kiam elŝprucas ĉiuj foli- kaj florburĝonoj! Intereso-plenaj vizitoj sub la gvidado de esperanto-parolantoj!

2= ALTKVALITA, INTERNACIA VESPERO*
= aŭtentika internacieco de la ĉeestantaro.
= filmo en esperanto pri nia gastig-lando (tre rara evento!).
= partopreno de jam famiĝinta artisto el Hungario, Feri FLORO, gitaristo-kantisto... (La LEUVEN-kongresintoj memoras lin!).

3=KONATIĜO KUN LA UNUA, NACISKALA INFORM-KAMPANJO...*
*lanĉota en aŭtuno, per la nova inform-materialo de U.F.E. Organizo de la kunlaboro en nia Federacio. Ĉiu el vi alportu siajn ideojn...*

*Kiel kutime, la organizantoj kalkulas pri **via** ĉeesto!*

atentigo!

Se vi estos malhelpata ĉeesti nian jaran kongreson, kaj se vi estas Federaci-Membro, bonvolu ni petas, plenigi la ĉi-suban rajtigilon kaj postsendi ĝin al iu ajn ĉeestonto el inter viaj geamikoj aŭ konatuloj ..kaj..
Antaŭdankon!

---

RAJTIGILO = BON POUR POUVOIR
*****************

nomo

adreso

*... Mi transdonas mian voĉdon-rajton por la Kongres-eventoj en Luksemburgo, al S-ro / S-ino*

*kiu ĉeestos ĝin."*

*Subskribo:*

## NIAJ DONACINTOJ

*Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1982:*

S-in° ORY 169F - S-r° CROCHET 69F - S-r° BLOESING 100 F - S-r° FUCHS 27,51 F - S-in° ESPRIT 22 F - S-r° BERGEROT 122 F - S-in° DE FEYTER 50 F - S-r° RADAM 32 F - S-r° KNECHT 30 F - S-r° WERMELINGER 14 F - Diversa 1 F - Vendo de donacita vortareto fare de S-r° LIENHARDT 6 F.

## FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1982

**ENSPEZOJ**

| | |
|---|---|
| Kotizoj: | |
| *47 individuaj membroj* | 8 742 F |
| *16 simplaj membroj* | 640 |
| *73 federaciaj membroj* | 1 138 |
| *1 GEE-membro* | 4 |
| *3 JEFO-membroj* | 12 |
| *24 membroj (pago de UFE)* | 294 |
| Donacoj | 642,51 |
| Abonoj al E-°/revuoj | 99 |
| Glu-markoj + propagandiloj | 79,75 |
| Rentumo de ŝpar-konto | 725,84 |
| | 12 377,10 F |

**ELSPEZOJ**

| | |
|---|---|
| Kotizoj al UFE | 8 152 F |
| " GEE | 238 |
| " JEFO | 376 |
| " UEA | 189 |
| Afranko + sekretariaĵoj | 294,60 |
| Leter-papero | 115 |
| Folioj perkoresponda kurso | 250 |
| Komitat-kunsido | 168 |
| Perado de abonoj | 99 |
| Aĉeto glu-markoj | 165 |
| Propagando | 474,80 |
| Por ekspozicio | 1 000 |
| Por la libro-servo | 2 000 |
| Donaco al UFE | 500 |
| | 14 021,40 F |

## Eldonado de "LA INFORMILO" en 1982

**ENSPEZOJ**

| | |
|---|---|
| 222 abonantoj | 4 022,40 F |
| 45 lernanto-abonantoj | 720 |
| Repago dokumentoj (I° 38) | 104 |
| | 4 846,40 |

**ELSPEZOJ**

| | |
|---|---|
| Eldonado INF° 37 (470 ekz.) | 1 216,80 F |
| " 38 (380 ) | 1 064,40 |
| " 39 (370 ) | 751,50 |
| " 40 (400 ) | 1 300 |
| Send-kostoj por INF° 37 | 32 |
| " 38 | 38 |
| " 39 | 41,60 |
| " 40 | 41,60 |
| Sendo al eksterlando | 302,40 |
| 500 banderoloj | 105 |
| Etikedoj + diversa materialo | 250 |
| | 5 143,40 |

### BILANCO

| | |
|---|---|
| Elspezoj Federacio | 14 021,40 F |
| Enspezoj Federacio | 12 377,10 |
| Deficito Federacio | 1 644,30 |
| Elspezoj INFORMILO | 5 143,40 F |
| Enspezoj INFORMILO | 4 846,40 |
| Deficito INFORMILO | 297,00 |

### REZULTO

..kiam..

| | |
|---|---|
| EN LA KASO JE LA 31.12.81 | 7 591,86 F |
| DEFICITO FEDERACIO | 1 644,30 |
| DEFICITO INFORMILO | 297 |
| EN LA KASO JE LA 31.12.82 | 5 650,56 F |

Pro bona financa situacio, ni sukcesis investi por ekspozicio kaj por la libro-servo.

La kasisto:
A. GROSSMANN

# cours par correspondance

*Recrutement difficile pour notre cours cette année. Il semble que l'hiver doux que nous subissons (?) n'incite pas le public à étudier par correspondance. Depuis septembre nous avons adressé 49 communiqués à la presse, nous avons contrôlé la parution de 24 d'entre eux seulement, ce qui n'est déjà pas très favorable. Nous n'avons reçu au 7 février que 70 lettres de personnes intéressées et inscrit 18 élèves (l'an dernier à la même date nous avions reçu environ 100 lettres et il y a 2 ans... 140). Rappelons que nous avions 45 élèves à la fin de la dernière année scolaire, 50 il y a 2 ans et 60 il y a 3 ans. Actuellement il faut envoyer 3 communiqués pour recruter un élève!*

*Déjà un élève de cette année a terminé le cours élèmentaire en 3 mois environ: M. M. Boris POZNANSKI, 67230 Beufeld, dirigé par M. Guégüéniat (St-Pierre-des-Bois). Il est vrai qu'il prépare un DEUG en langues étrangères appliquées et possède déjà... 5 langues en dehors du français. Les adresses que le Koresponda Servo de U.E.A. lui a déjà procurées pourront toutefois lui permettre d'autres contacts, impossibles sans la langue internationale. Prami les élèves de l'an passé deux autres approchent de la fin du cours: M. BRULEBOIS (68140 Munster) dirigé par M. Ludwig et M. DEMANGEAT (88100 St-Dié) dirigé par par M. Godart.*

Dernière minute: 24 élèves sont inscrits à la date de parution de ce bulletin.

# nia vivo en ...

NANCY = En la Junuldomo Philippe Desforges, la kunveno de la E°-Klubo" okazas la 1an vendredon de ĉiu monato, de la 19a ĝis la 22a. La unua kunveno arigis 11 personojn en oktobro, 11 en novembro (antaù nia staĝo) 18 en decembro: ĝi estis "speciala"kunveno datrevene al la naskiĝtago de Dr° Zamenhof. Dum januaro "reĝumis" 7 personoj kaj en februaro, pro gripo kaj eble ĉar kukoj ne plu estis ofertitaj, nur 5 ĉeestis...

La 3a/grada kurso arigas kutime 5 personojn la 1an mardon de l'monato, kaj la 2a/grada 5 aliajn 2-foje monate. Ni ĉiam pretas startigi novan kurson por komencantoj ek de kiam almenaù 5 personoj interesiĝos, sed ĝis nun vane...

En la Beletra fakultato, ĉirkaù 15 studentoj partoprenas la kurson gvidatan ĉiumonate de Denis KURT.

Nia perkoresponda kurso do ne tre bone funkcias. Laù iniciato de S-r° Ludwig, ni dissendis en la la lasta n° de LA INFORMILO la cirkuleron pri la kurso, esperante ke multaj legantoj klopodos varbi po unu lernanton. Vana espero! tamen ne estas tro malfrue: provu nun varbi por nia kurso! Kun la sama espero ni starigis reton de korespondantoj, al kiuj ni liveris cirkulerojn kaj propagandilojn por respondiinformpetojn. Ĝenerale ankaù preskaù vane. Ĉi-jare ni indikis fine de ĉiu komuniko, krom nian adreson en NANCY, ankaù adreson de loka kunlaboranto en ĉiu departemento. La rezultoj estas ĝenerale malbonaj: ekzemple "La Liberté de l'Est" (Epinal), kiu enpresis ĉiujn niajn komunikojn lsatjare, ne plu enpresis de kiam ni anoncis lokan adreson! Ĝi denove enpresis la lastan... en kiu la loka adreso ne aperis! En Metz, le "Républicain Lorrain" enpresis nun ĉiujn komunikojn kun 2 lokaj adresoj sed la rezulto estas tre malgranda. En Mulhouse "L'Alsace" same bone enpresis kun loka adreso (lastjare preskaù tute ne), ankaù "L'Union" (Reims) kaj "Dernières Nouvelles d'Alsace" (Bas-Rhin kaj Ht-Rhin). Sed ankaù tie la rezultoj estas pli malbonaj ol antaùe.

La diversaj kunlaborantoj ricevis entute 23 informpetojn, laù la informoj kiujn mi disponas. S-r° Guégüéniat, kies adreso aperis en 3 alzacaj gazetoj ricevis nur 1 leteron. (1 aliĝo!). S-in° Bernez, 2 (0 aliĝo). S-r° Ludwig 1 (1 aliĝo). S-r° De Zilah 4 (2 aliĝoj) S-r° Guillaume 1 (1 aliĝo). S-r° Crochet 7 (1 aliĝo). S-in° Nau 1 (1 aliĝo). S-r° Grossmann 4 (2 aliĝoj). S-in° Roux ricevis unu telefonan vokon (2 aliĝoj). Fine per "METODO 4" en Nancy: 2 respondoj, 2 aliĝoj. La 5 aliaj aliĝintoj skribis rekte al Nancy antaù ol aliĝi (do 5 el preskaù 50 leteroj).

AGADO AL "LIBERAJ RADIOJ" = Per la kunlaborantoj de la perkoresponda kurso mi povis ricevi adresojn de 25 liberaj radioj, al kiuj mi sendis cirkuleron. El Marne 2 leteroj revenis kun mencio "ne kompleta adreso", do ne sufiĉas disponi pri adreso, ekzemple "RADIO-REIMS AVENIR -51100 REIMS", sed oni devas aldoni la indikojn pri strato aù poŝt-kesto. Pozitive reagis el Nancy "Radio Active", kiu proponis disaùdigi ĉiujn informojn pri nia agado. Kontaktitaj telefone, la respondantoj promesis proponi poste rendevuon, por eventuale regula rubriko pri E°; ili eĉ ne rifuzis proponon pri eventala kurso.

J.P. COLNOT

..okazos..

PONT-ST-VINCENT

*Mi gvidas kurson kun 15 lernantoj de mia lernejo. La kurso okazas ĉiun mardon (dum unu horo). La infanoj korespondas kun samaĝaj geknaboj de Jugoslavio. Ni sendis kolektivan leteron, la Jugoslavoj respondis per personaj leteroj kaj kelkaj el miaj lernantoj denove skribis. kompreneble ili france skribis kaj mi tradukis. Post kelkaj monatoj ili eble povos esperante skribi. ili estas tre kontentaj korespondi. Ankaŭ mi!*

*R. Guillaume*

BRUYERES

En la liceo de Bruyères la Esperanto-kurso ekfunkciis la 1an de oktobro kun 17 gelernantoj el la "unuaj" klasoj (1èreA, B, G, S) kaj 2 el la "fina" klaso. Estis malfacile trovi konvenan momenton, por ke ĉiu povu partopreni spite al la tre diversaj horaroj de la sekcioj.
Ni kunvenas ĉiusemajne de la 12a50 ĝis la 13a30, tio estas dum apenaù pli ol duonhoro! Tial granda parto de la laboro devas fariĝi hejme, kaj mi despli gratulas la gejunulojn pro ilia bonvolo.

J.-L. Claudel

BAR-le-DUC

*La kvar ĉeestantoj de la unua kurso daŭre fidelas. La iamaj lernintoj kunsidas regule (en la sino de la respektivaj familioj interesataj!) por riĉigi siajn lingvosciojn en tre agrabla etoso. La Direktoro de la t.n. "Ecole Normale" disponigis sian materialon kaj la teknikiston al teamo de 3 homoj, kiuj registris sur sonbendon la tutan "Metodon 11". U.F.E. prizorgos ties multobligadon. La loka respondantaro de la "internacia karnavalo" daŭre ricevas aliĝilojn el eksterlando. Du specifaj kunvenoj detale preparis la programon de tiuj 3 tagoj (vidu la alilokan anoncon en la "pojunulara paĝo".)*

STRASBOURG

La 18an de decembro la strasburgaj "Bahaanoj" organizis debaton pri la temo: Kial Internacia lingvo? Proksimume 40 personoj (ne-esperantistoj) aùskultis la prelegojn kaj respondojn de 4 prelegintoj:
S-r° Wilson BARRET, profesoro pri la angla lingvo ce la Eùropa Konsilantaro, defendis la anglan per bonkonataj argumentoj... *"Gi jam estas la plej parolata lingvo en la mondo kaj krome, senanima (?) artefarita planlingvo ne povus taùgi kiel internacia lingvo..."*
S-r° Azzedine KACED, inĝeniero pri informatiko, montris la problemojn kaùzitajn en tiu fako far la nunaj naciaj lingvoj, ekzemple en la franca, la samsoneco de pluraj literoj (q, k, c). Li kvazaù laùdis la tiurilatajn avantaĝojn de Esperanto, sed tion li mem ne sciis.
S-r° Edmond LUDWIG , profesoro pri germana lingvo, prezentis la Lingvon Internacian kaj substrekis ties facilecon. Li sukcesis veki scivolemon ĉe la ùaskultantoj.
S-r° Bernard AUNIS devis prezenti *Interlingua*, sed dirinte ke tion li ne povas fari en 10 minutoj, li vigle defendis planlingvojn ĝenerale kaj tre lerte subtenis Esperanton.
La debaton gvidis S-r° CREVEL, strasburga membro de la monda Bahaa-komunumo.

ATENTIGO: En "La Informilo" n°37 de la 1a trimestro 1982, paĝo 13, sub la rubriko "EN STRASBURGO, la dua paragrafo devas esti korektota laù sekvanta teksto:
*Nova gvidlibreto tra Strasburgo, mendebla ĉe "CENTRE CULTUREL D'ESPERANTO", 1, pl. Mérian, 67000 STRASBOURG,(Esperanto-Teksto), kontraù sendo de poŝtmarkoj je 2,90 FF aù unu respondkupono.*

************************

..nia venonta..

bonvolu noti!...

★ ESPERANTO-RENDEVUO DE L.F. - KOOP
Mesnil-St-Père (apud TROYES) 23/24 aprilo — Suzanne BOUROT, 15/B rue Morel-Payen F-10000 TROYES

★ INTERNACIA SEMAJNO T.A.N.E.F.
en BERGEN (apud AMSTERDAM) 16/23 aprilo — Manna BEIJNE, Vijf Meilaan 131, NL-2321 RK LEIDEN

★ INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ KAJ PEDAGOGOJ
Esperanto-Domo GRESILLON, 3/9 aprilo — E°-Domo, GRESILLON 49150 BAUGE

★ KULTURA SEMAJNFINO DE S.E.L.
Homburg/Saar 27/29 majo — S.E.L. Schulstraße 30, D-6601 SAARBRÜCKEN-SCHEIDT


KAJ...

17A STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO

**Ermitage de Moulins-lès-Metz**

**25an kaj 26an de junio 1983**

ĈIUJ DETALOJ KAJ ALIĜILO EN NIA VENONTA BULTENO!!




*... ekde nun mi informos vin en ĉiu numero de "LA INFORMILO" pri la aktualaĵoj de la junulara movado en la regiono, en Francio kaj eksterlande!*

***********************

## – kio estas J.E.F.O.?

## Junulara Esperantista Franca Organizo

JUNULARA...

Ĝiaj membroj estas junaj, ĝiaj aktivuloj estas junaj.
Kelkaj gejunuloj aktivas por interesigi aliajn pri Esperanto kaj helpi al la jam lernintoj aŭ lernantoj utiligi la lingvoscion.
Ĉiuj membroj de U.F.E., ĝis aĝo 26, estas membroj de JEFO, kaj ankaŭ eblas est nur JEFO-membro. Sed ni ne opinias, ke je aĝo 26 oni subite ne plu estas juna! Niaj aranĝoj estas por gejunuloj ĝenerale, sen preciza aĝlimo.
homo super 26 povas iĝi "PATRONO de JEFO" kaj tiel ricevi niajn eldonaĵojn kaj subteni nin.
kelkaj gejunuloj pli ol 26-jaraj ankoraŭ aktivas en JEFO; por ili ni kreis la "KONSULTAn KOMITATOn": ĝi estas konsilantaro kaj kunlaborantaro.

JUNULARA E°-MOVADO ekzistas ankaŭ m o n d s k a l e . . .
JEFO agadas por ĝin vivigi en Francio.

ESPERANTISTA... nu, kompreneble!

JEFO celas disvastigi E-°n inter la gejunulojn, kaj OFERTI SERVOJN al la junaj esperantistoj.
Oni lernas E°n pro idealismo aŭ pro praktika intereso aŭ pro iu ajn kaŭzo; ĉiuokaze, kial ne uzi ĝin, eluzi ĝin, ĉiam kiam eblas? Dum ferioj, vojaĝoj, studoj; hejme ankaŭ. Por akiri pli vastan amikaron, aŭ kulturon, aŭ poŝtmarkokolekton.

JEFO informas pri la eblecoj uzi Esperanton.

= ĝenerale: per la informilo *"Vous apprenez l'espéranto?... j'en suis fort aise..; Eh bien, utilisez-le maintenant!"*
= siajn membrojn, regule, per la bulteno "JEFO informas" kaj "KONCIZE"... kaj mem aranĝas renkontiĝojn kaj aliajn servojn.

FRANCA...

JEFO informas franclingve pro la komencantoj, per sia bulteno kaj la varbilo jam citita.
FRANCA... sed en INTERNACIA MOVADO...
JEFO estas la franca sekcio de T.E.J.O. (TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO – ni klarigos pri ĝi en la venonta numero).

JEFO eldonas, kun aliaj okcident-eŭropaj landaj junularaj asocioj, la dumonatan bultenon *"KONCIZE"* kaj dissendas ĝin al siaj membroj. Per ĝi la informoj fluas inter la gejunuloj de Francio kaj tiuj de la najbaraj landoj.
JEFO kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ) en 1983 triafoje kunorganizas *"Franc-Germanan Seminarion"... (homoj el ĉiuj landoj povas partopreni)* kaj planas grup-interŝanĝojn, ĉio kun subvencioj de l'OFFICE FRANCO-ALLEMAND POUR LA JEUNESSE (O.F.A.J.)

ORGANIZO...

Kial organiziĝi?... El la asocia strukturo de JEFO rezultas KONSTANTAJ RILATOJ...

= ... kun la internacia Junulara Movado (TEJO, Koncize, Junularaj Asocioj en aliaj landoj)
= ... kun UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA)
= ... kun UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO (UFE), kies Junulara Sekcio... JEFO estas!
Ni havas komunan sidejon en Parizo, en kiu ni ricevas la kurieron, havas niajn arkivojn kaj dokumentojn, kaj okazigas kunvenojn kaj ikajn vesperojn. Ni informas iliajn membrojn per ilia revuo; inter ili iuj instruas E°n al gejunuloj, do tre grava ponto ili povas esti inter la junaj gelernantoj kaj la junulara movado.
JEFO kaj UFE kunlaboras en la daministrado.

..stago..

STRUKTURO

La membraro ("abonantoj" kaj "simplaj...") elektas el inter si la KOMITATO-N dum la Ĝenerala Asembleo.
La komitato elektas inter siaj membroj la ESTRARO-N (prezidanto, sekretario, kasisto, ktp)
La estraro elektas la anojn de la KONSULTA KOMITATO inter aktivuloj de la junulara movado super aĝo 26. Ili rajtas partopreni la kunsidojn sed ne voĉdonas.

AGADO

informado = *eldono de la varbiloj (laste, por junaj gelernantoj)*
= *eldono de la bulteno "JEFO informas"*
= *kuneldono de la internacia bulteno "KONCIZE"*
= *ĉe regionaj kongresoj*
= *respondo al informpetoj*


organizado... *de junularaj renkontiĝoj.*
= *en 1983:-karnavalo en BAR-le-DUC (55) en marto*
*-"konvala" semjanfino en Normandio fine de aprilo, kun la lokaj grupoj*
*-franc/germana seminario en julio kun GEJ (lastjare en julio, en AIX-en-PROVENCE)*
*-interŝanĝo kun pola junularo por la somero 83*

subtenado kaj helpo... *al lokaj iniciatoj per informado internaci-skala kaj kontaktoj kun aliaj landoj. Ekzemple, internacia grup-interŝanĝo junulara semajnfino...*

organizado de ... *PASPORTA SERVO en Francio (gastiga servo de TEJO)*
... *KONGRESA SERVO (por kunvojaĝigi gejunulojn, kiuj partoprenas saman E°-aranĝon)*

****************

... *Ĉu vi estas juna, esperantista, franca?... Nu, organiziĝu!*
JEFO, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS
... *respondos viajn demandojn.*



******************

## partoprenu kun ni :

### * Karnavalo en BAR-le-DUC - 55 — 18/20ajn de marto

Okaze de la urbaj Karnavalfestoj:

Preparado de maskoj - Partopreno en granda maskobalo - Giganta surstrata promenado kun la grupa temo "ESPERANTO KAJ TURISMO"...

kunloĝado! kunmanĝado!... ĉeestos gejunuloj el pluraj fremdaj landoj!

Partopren-kotizo: sub aĝo 16 , kaj eksterlandanoj: 60 FF
Francoj super 16j.: 100 FF

Lidja BLOCH, 11 rue des Ducs de Bar, 55000 BAR-le-DUC, tel.: (29) 76 11 28

### * "Konvala" Semajnfino en YVETOT - 76 — 29an de aprilo/1an de majo

Kabareda vespero kun Jak Le Puil kaj FERI FLORO, juna hungara kantisto (esperantista!)

teatra spektaklo kun TESPA - klaŭnado - bicikla kaj piedira vizitoj tra la urbeto kaj ĉirkaŭaĵoj: Normandio en florado pro pomarboj...

Partopren-kotizo: 100/120 FF
J.E.F.O. (adreso supre)

respondecas pri tiuj 2 paĝoj Anne AMBLES

* * *

..de parolata..

## PARTA RENOVIGO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Laŭ nia statutaro, ni devas ĉi-jare antataŭigi -aŭ reelekti- ses (6) komitatanojn. Tiu evento okazos dum nia normala kunsido en Luksemburgo.

Ĉiu volontulo (-ino!) deziranta plenumi efikan taskon en la sino de la komitata skipo, bonvolu sciigi tion pere de la aliĝilo al la Federacia Kongreso aŭ per rekta letero al nia sekretario: E. LUDWIG, 46,Rte de la Schlucht, STOSSWIHR, 68140 MUNSTER.

Oni ankaŭ povos sciigi sian kandidatecon je la tago de la Kongreso.

Je la hodiaŭa tago, 6 homoj jam konfirmis, ke ili estas kandidatoj:

Anne AMBLES - 55 BAR-le-DUC
Pol DENIS - 55 BAR-le-DUC
Jean-Luc TIBIAS - 54 VANDOEUVRE
Bernard VIVIER - 54 JOEUF
Bertrand WICK - 67 STRASBOURG
Madeleine DE ZILAH - 57 METZ

*******************

## ĉu vi forgesis ?

— *La "moderna" viv-ritmo kulpas tre certe pri tio: kelkaj el niaj fidelaj membroj ne ankoraŭ pagis siajn kutimajn kotizojn aŭ abonojn.*


— *Estiĝas delikata kaj temporaba plulaboro por la kasisto kaj por la sendanto de LA INFORMILO (apartigo de la adresoj laŭ kritero de ne-pag-situacio,enŝovo de fak-instigilo en la bultenon, k.t.p.).*

— *Ni do antaŭdankas al vi pro frua pago via!*

*******************

"La Tribune de Genève"

### «Bonan Tagon!», un industriel lance une montre espérantiste




Savez-vous comment l'on dit «bonjour» en espéranto? Simplement «Bonan Tagon» et si vous le voulez, une nouvelle montre-bracelet suisse vous le rappellera chaque fois que vous la consulterez.

L'idée est née de la rencontre fortuite, au gré des hasards de l'auto-stop, entre «Parzival», alias Serge Reverdin, fougueux chevalier portant haut les couleurs de l'espéranto, et d'un industriel de Grandson, légèrement déprimé par la morosité de l'horlogerie helvétique.

Et c'est ainsi que cette nouvelle montre, 100 % suisse, sera chargée de mettre tous les espérantistes et leurs sympathisants à la même heure, pour le prix d'environ 140,– francs en magasin. La vente de ce modèle, que l'on trouvera sous peu dans les boutiques genevoises, fera d'abord l'objet d'une première série de 100000 exemplaires et servira à financer un film sur l'espéranto et sur lequel les animateurs du mouvement fondent beaucoup d'espoir pour sa diffusion:

«Nous sommes optimistes, déclare «Parzival», déjà la Hongrie a inscrit l'espéranto dans la liste des langues étrangères à option de son programme scolaire et la France mène des études dans ce sens.


»Pour ceux qui veulent en savoir plus sur le rôle de cette langue, ils peuvent prendre contact avec le Centre genevois d'information d'espéranto, 2, chemin de la Montagne, 1224 Chêne-Bougeries, tél. 286656.»

**L. M.**

*...ĉar vi ĉiuj aĉetis la freŝbakitan diskon de Max-Roy Carouges, "ES° kaj LIBERECO" oni rajtas esperi, ke tuj post kiam tiu brakhorloĝo estos havebla ĉe ni, vi ĉiuj plezurigos "iun" donacante "ĝin! Apartenas ja al la esperantistoj, ke tiu svisa iniciato trafu sukceson!*

*

# ...″Via″ paĝo...



... Ĉu vi jam renkontis la cignojn de la urbo Bruĝo?...

La urbaj cignoj ĝuas specialajn favorojn... jam de 1488 se la legendon ni fidas.

Dum tiu jaro la Bruĝanoj ribelis kaj enkarcerigis sian "Sinjoron" kaj Ĉef-Dukon Maksimiliano de Aŭstrio... kaj tranĉis la kolon de sia fidela konsilisto Petar Lanchals (...kies ĉefnomo signifas "longa kolo", cetere lia blazono entenis cignon).

La Ĉefduko fine promesis konsenti al la depostuloj de la ŝtatanoj kaj liberigis ilin. Li tamen ordonis, ke por kompensepuni la mortigon de Petro Lanchals... la burĝanoj devus porĉiame konservadi kaj bredadi longkolajn birdojn sur la kanalo de sia urbo.

Fakte la Princo mankis je sia parolo sed ne la Burĝanoj! De post 5 jarcentoj la kanal-akvoj estas plenigitaj je cignoj. La birdoj estas posedaĵo de la urbo, "grasigitaj" de ĝi kaj markitaj sur la beko de la ĉeflitero B; ankaŭ dato de la naskiĝo kuŝas tie!
...
Sed eble ankaŭ la Bruĝaninojn vi rimarkis... Se estas necese nuntempe kredi je malnova kaj plaĉe eleganta proverbo, la Burĝanoj estus "iaj ajn"... sed la Bruĝaninoj... o! kia belbrilegeco! Prijuĝu vi-mem: jam en la jaro 1301, kiam ŝi eniris la urbon, Johanino de Navaro, franca reĝino, asertis kun iom da acideto: Mi kredis esti tie la sola Reĝino sed sur la stratoj mi vidas centojn!...
Kiam Filipo la Bona intencis krei kavalir-ordenon, li donos al ĝi la nomon "Ordeno de la Ora Hararo" per aludo al la orumita kap-harara, ĉarmega, bruĝa fraŭlino Maria Crombrugghe.

En la jaro 1837, Victor Hugo, trapasante Bruĝon, volis konstati per si mem la legendan gracon de la virinoj...(!)...

raportas nia amiko Jean DEMISSY

* * *

Ni plezure aperigas tradukverkojn de nia samideano Bernard AUNIS... Ĉar LA FONTAINE ja inspiris multe da tradukdezirojn ĉe la esperantistoj, vi tutcerte konstatos, ke ĉiu el ili posedas sian propran stilon.

## LA KORVO KAJ LA VULPO


*************

*Sur alta branĉo korvo firme tenis*
*Fromaĝon bonodoran en la bek',*
*La subtilnaza vulpo baldaŭ venis*
*Kaj alparolis ĝin en sia blek':*
*"Ho, Via Korva Moŝto respektinda!*
*Sendube mi ĝis nun estadis blinda,*
*Ne rimarkante, kiel belas vi.*
*De vi mi admiradas la fromaĝon...*
*Pardonu: mi dirvolis la vizaĝon:*
*De via belo konfuziĝas mi.*
*Ja nekredeblas, kiel viaj plumoj*
*Brilegas sub la suno per mil lumoj;*
*Se tiel bele sonas via kant',*
*En la arbaro estas ne loĝant',*
*(Sen mento) kiu dirus sin kapabla*
*Rivali kun vi por la besta kron':*
*Vi estas kvazaŭ la fenikso fabla."*
*Tuj de ĝojego kaj de fanfaron'*
*Ebriis nia korvo; elegante,*
*Radante ĝi paradis kiel pav'*
*Kaj okulferme pro grandega rav'*
*Malfermis sian bekon, faligante*
*La avidaĵon antaŭ la trompul'...*
*Ĝi prenis ĝin kaj diris sen skrupul':*
*"Beniĝu Dio! Li, por mia vivo,*
*Al korvo donis tiom da naivo!*
*Stultula malmodesto estas min'.*
*Ne ploru tamen nun kaj, kredu min,*
*Se iom pli vi malkonfidos poste,*
*La lernon vi ne pagis multekoste."*
*La honta korvo ĵuris, ke ne plu*
*Trompiĝos ĝi... sed kun tro da malfru'.*

*Leganto kara, se vin iu vulpos,*
*De nun vi sciu do, ke nur vi kulpos.*

*Bernard AUNIS*

* * *



– Temas verŝajne pri sarkofago el "moderna" epoko...

# NIA FEDERACIA LIBRO-SERVO

ADRESO: BP 23, F-54510 TOMBLAINE

171 - La trofeoj (Heredia-Waringhien) 36,00
172 - Tutmonda Sonoro (Kalocsay) 150,00
173 - Vagado sub palmoj (Ribillard) 16,00
174 - La vendreda vespero (Opo) 14,00
175 - La verda relo (Opo) 40,00
176 - Verda robo (Rosbach) 42,00
177 - Verdkata testamento (Schwartz) 35,00
178 - Vereco, distro, stilo (Auld) 33,00
179 - Vivendo (Gabrielli) 40,00
180 - Vivo de Zamenhof (Privat) 43,00
181 - Vjetnamio: kiaj homaj rajtoj. 5,00
182 - Vojaĝo al Faremido (Karinthy-Tarkony) 35,00
183 - La vojo al Nirvano (traduko de Anuruddha) 10,00
184 - Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari) 40,00
185 - Vorto kaj vortelemento en E° (Szerdahelyi) 7,00
186 - La vort-teorio en E° (De Saussure) 30,00
187 - Lidja Zamenhof (Dratwer) 25,00

## NOVAĴOJ EN NIA LIBRO-SERVO

188 - Auli: rakonto pri knabeto (Adamson) 25,00
189 - Blanka sablo (Vjetnamiaj fabeloj, legendoj) 5,00
190 - Miriadoj da lumoj (vidu supre) 5,00
191 - La Normandaj rakontoj (Maupassant - Dupuis) 36,00
192 - La prezo de la elaĉetado (por katolikoj) 40,00
193 - Reveno (vidu 189) 5,00

************************

## BALDAÙ NI HAVOS EN NIA LIBRO-SERVO

194 - "Eseoj V" (Waringhien) 100,00
195 - lernolibro (Childs-Mee)
...
196 ĝis 221 estas atendataj de la eldonejo ILTIS.
Inter ili estos "Asteriks" 28,00

## VORTAROJ - LERNOLIBROJ

222 - Junulkurso 25,00
223 - Suplemento 5,00
224 - Disko-serio de Junulkurso 35,00
225 - Kasedo de " 35,00
226 - Nouveau Cours rationnel 40,00
227 - Kasedo de " 35,00
228 - Diction. prat. bi-directif 60,00
229 - Plena Vortaro 60,00
230 - Gd Diction. E°/Fr. (Waringhien) 70,00
231 - Dicton. de poche bi-dir. 15,00
232 - Plena Ilustrita Vortaro 260,00
233 - Plena Analiza Gramatiko (Waringhien) 110,00
234 - "Metodo 11" 35,00
235 - "Metodo 12" 39,00
236 - E° por infanoj 10,00
237 - "Por la Praktikantoj" 22,00
238 - "Paŝoj al plena posedo" (Auld) 40,00
239 - Praktika Bildvortaro 35,00
240 - Diction. Prat. Fr/E° 40,00

****************************

La eldonejo TK|STAFETO intencas reeldoni ĉiujn "Eseojn" de profesoro Waringhien. Temas pri:

**Eseoj 1aj: Beletro (1956)*
**Eseoj 2aj: Lingvo kaj Vivo (1959)*
**Eseoj 3aj: Ni kaj ĝi (1972)*
**Eseoj 4aj: 1887 kaj la sekvo (1980)*

*Nia libroservo pretas antaŭmendi ilin. Se iu el vi deziras tiujn librojn, kiuj ne rajtas manki en taŭga biblioteko debona Esperantisto, li bonvolu doni sian nomon kaj tuj post la reeldono li ricevos la verkojn.*

## sur nia librobreto

...paĝo 9!

BLANKA SABLO, MIRIADO DA LUMOJ, REVENO = Temas pri tri libretoj eldonitaj de la "Fremdlingva Eldonejo" en Hanojo. Tiuj tri libroj estas ĉarmaj pro la bona stilo, sufiĉe simpla, pro la enhavo de la rakontoj, legendoj kaj fabeloj. Ĉiuj estas tradukaĵoj, kiuj konatigas al ni la vjetnamian literaturon, ĉu pasinta, ĉu nuntempa. Kaj ĉar ili estas malmultekostaj, kial ne mendi ilin?

AULI, RAKONTO PRI KNABETO de Hendrik ADAMSON = Tiu libro eldoniĝis jam en 1934. La librejo "ILTIS" bone faris reeldonante ĝin de nia sufiĉe granda poeto el Suda Estonio. La historio de la rakonto estas interesa. Vi povos konatiĝi kun la stilo intermilita kaj lerni kelkajn vortojn. Jen por ekzemplo:..."Cie aliloke ĉirkaŭstaris nur kampoj kaj kampoj, kvazaŭ teksaĵoj diverskoloraj: la orkolora cejanoza sekalo, la verdaj somergrenoj; la ruĝa tri-folio, la rozete blanka poligono ĉiam pli grasiĝis kaj saturis la venton per ĉarmaj odoroj, tiel ke ĝi fine mal-diligentis blovadi kaj langvore ekdormetis". stilo de poeto, agrabla stilo.

LA NORMANDAJ RAKONTOJ de Maupassant = Mi ne parolos pri la temoj de la rakontoj bone konataj de la Francoj. Mi nur substrekas, ke la traduko estas perfekta laŭ la sekvo de la originala teksto kaj laŭ la redono en la franca: modelo de traduk-arto.

Via libro-servisto: Roger DEGRELLE

*Se vi jam pagis vian kotizon por ĉi-jaro, vi trovos en ĉi-tiu n° kelkajn aldonitajn glu-markojn.* Novaj UFE-membroj aparte ricevas la membro-kartojn.

Orientfranca
Federacio
1983

*1/ Jarmarko por ĉiuj niaj membroj (federaciaj kaj aliaj)*
*Vi gluu ĝin dorse de via Federacia Membro-karto.*
*(tiucele vi forigu la subpaperon... la marko estas memgluebla).*

UFE 1983

*2/ Jarmarko por la UFE-membroj. ĝi estas rozkolora por la simplaj membroj, kaj blua por la individuaj membroj. Vi gluu ĝin sur vian UFE-Membro-karton.*

MEMBROMARKO
UEA 1983

*3/ M La membro-mark-folio de UEA konsistas el:*
*= membro-markoj uzendaj por rilati kun UEA-delegitoj. ili atestas vian membrecon (gluenda sur ĉiu pet-letero al iu ajn delegito.)*

U E A 1983 U E A

*= La Jarmarko por la UEA-membroj. Vi eltondu ĝin kaj surgluu sur vian UEA-membro-karton*

*Se vi ne jam pagis vian kotizon aŭ vian abonon vi trovos en ĉi-tiu bulteno novan kotiztabelon kaj memorigilon, per kiu vi povos informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidon kaj urĝe pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu n° de LA INFORMILO estas la lasta sendita al vi* se vi ne renovigas



Se via pago interkruciĝis kun la sendo de tiu-ĉi INFORMILO, tiam intertempe via abono ordiĝis kaj la kunsendita alvokilo ne plu koncernas vin!

---

*AL NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ* ☆

*En la antaŭa n° de LA INFORMILO (N°40) aperis granda kotiz-tabelo, "bedaŭrinde" franclingve, pri la kotizoj kaj abonoj por 1983. Tial ni deziras aparte informi al niaj eksterlandaj abonantoj, ke la abono al la INFORMILO por 1983 estas 18 FF aŭ 8 internaciaj kuponoj (respond-kuponoj aĉeteblaj ĉe ĉiu Poŝt-oficejo)*

Se vi ne jam pagis vian abonon por la nova jaro, bonvolu fari tion sen prokrasto.

*Vi povas pagi per simpla poŝta ĝiro al nia Poŝt-Ĉek-Konto:*

*—— FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO*
*P.Ĉ.K° 1997-72 W NANCY*

*aŭ per sendo de 8 IRK al nia kasisto:*

*—— S-r° André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées*
*F 68390 BALDERSHEIM*

*Krome ni deziras informi vin, ke* ĉi-tiu N° (41) estas la lasta sendita al vi, se vi kiel eble plej frue ne renovigos vian abonon.

*Se vi jam pagis vian abonon, tion vi facile povas kontroli jene: kiam supre de via adreso sur banderolo troviĝas kod-numero, kiu komenciĝas per 3 (ekz. 3A63), tiam vi povas esti certa, ke via abono por 1983 estas pagita.*


*La kasisto,*
*A. GROSSMANN*



# distra anĝelo



## KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE = 1 okazo por aliigi sian vizaĝon - radio phenomeno(r) - 2 kunmiksaĵo - elekti neniam atingotan intencon. 3 forte eliĝi en gutoj(r) - azia laboristo - trinkaĵo(r). 4 kovras ofte truon - konsumu! - aspekto de l'vizaĝo(r) . 5 monero - franca rivero - parto de logaritmo. 6 rilata al geometria surfaco - posteulo(r). 7 jupli supra ĝi staras... despli nenecesa ĝi fariĝas - feo. 8 duonrolo - por komenci operacion - forigi mallumon(r) - parto de sitelo. 9 parto de encefalo - fromaĝ peco. 10 havi ofte nepersonan ideon(r) - ĉagrenadverbo. 11 ĉiam priatentata ĉe landlimo - sedimento - en la medolo. 12 karakterizas bonan grupanon - ne ŝatata de la lango.

VERTIKALE = 1 ne ŝatata de la institucio n°11 H. - rusa jeso. 2 abundo - rakonta poezio. 3 malabunda - granda peco de karoto - prepari ŝipon. 4 jen kio estas homo por homo - strebi(r). 5 ĉe l'komenco de ĉiu agado - malnova mezurunuo - besto kun sangoruĝaj okuloj(r). 6 malplena spaco - instiga ordo! - koncernanta italan insulon. 7 ne generanta melankolion! - preskaŭ finkonstruita domo - senvosta dezertbesto - 8 herbo(r) - muzo - kongrui(r). 9 odora herbo - tre malhela - kapo de simio. 10 fabela estaĵo - arbedo - en la centro de l'modo. 11 kontraŭtusa herbo - elemento de psi kologio - iom da realismo. 12 por komenci dieton - simbolo de blankeco - enmeti fadenon tra tiucela aper turo.

---

SOLVO de la lasta krucvortenigmo: artefaritaj-se-iru-alojo-tatui-kil-ul-epok-aŭto-ran-lan-edz-isat-enuo-sil-eki-mon-ke-amido-do-oĵ-aĝo-dek-du-on-li-ne-el-do-ĉielo-admon-inhal-mot-ba-pseŭdo-orfoj-liut-istmo-la-od-zoster-kod

---

**SILABENIGMO** * *Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. la 1a kaj 3a kolonoj, vertikale legataj, formas proverbon.*

ad amo ap ba ef ek em era eri et fo go ha ja la la li lo lo lo lu me mo moj nas no o ok om os pe po pre re ro ro rso ski sku so so ta ti to ta tru ulo vi vo zo

| | |
|---|---|
| 1 . - . - - - | oni foje perdas la nordan |
| 2 . - . - - | spegulo de l'animo |
| 3 . - . - - - | plej ŝatata el la kvar |
| 4 . - . - - - - | vundita kvadrato |
| 5 . - . - - - | skota lakto |
| 6 . - . - - - - | per tia kurso oni ne bone lernas |
| 7 . - . - - | tre multekosta porka eltrovaĵo |
| 8 . - . - - - - - | sciencisto tre scivolema pri ni |
| 9 . - . - - - - - | pere de ĝi lumo povas fariĝi mallumo |
| 10 . - . - - - - - | ne tute komprenas |
| 11 . - . - - - | homa muelilo |
| 12 . - . - - - - - - | n°5 estas unu |
| 13 . - . - - - | oni do rajtas fidi ŝin (lin!) |
| 14 . - . - - - - | insuloj |
| 15 . - . - - - - | ne longdaŭra |
| 16 . - . - - - | en ĝi oni bone dormis |
| 17 . - . - - | viktimo de sia frandemo |

LA SEKRETO DE LA FRUKTOBREDISTO... *

*same kiel li, transformu mirtelon en pistakon ŝanĝante naŭfoje sinsekve unu literon en ĉiu vorto!*

m i r t e l o
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
\- - - - - - -
p i s t a k o

---

*imprimé par L'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC. Le rédacteur: Pol DENIS. Le directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT.*
*Dépôt légal n°245. Inscription à la CPPAP sous le n° 62887.*